

Reviewer's address

Universität Duisburg-Essen, Standort Duisburg
 Fakultät 2: Germanistik
 Lotharstr. 65
 D-47048 Duisburg, Germany
 Ammon@uni-duisburg.de

About the reviewer

Ulrich Ammon is Professor of Linguistics and German at the University of Duisburg, with a particular interest in the sociology of language, dialectology, and the teaching of language. His recent publications include *Ist Deutsch noch internationale Wissenschaftssprache?* (1998), reviewed in *LPLP* 1/2001, and *Deutsche Sprache international* (1999).



Sue Wright. *Community and Communication: The Role of Language in Nation State Building and European Integration.* Clevedon: Multilingual Matters, 2000. 280 pp.

Rezenzita de Liu Haitao

Se oni rigardas nur la titolon de la recenzita libro *Community and Communication* (Komunumo kaj komuniko), ne estas facile diveni pri kio temas. Sed, la subtitolo tuj malkaŝas la sekreton: “La rolo de la lingvo en naciŝtata konstruado kaj eŭropa integriĝo.” Tiu ĉi certe ne estas nova temo: kiel informita interlingvisto, mi jam legis tro multajn aĵojn pri la temo, kiuj ofte restas ĉe surfacaj argumentoj sen taŭge proponita solvo. Tamen sur la dorsa kovrilo mi trovis tiajn frazojn: “This should be an important and widely used book” (Tiu ĉi devus montriĝi grava kaj vaste uzata libro), “... goes straight to the heart of contemporary politics. This book will make people rethink their ideas about language” (rekte aliras la koron de nuntempa politiko. La libro igos la homojn repripensi siajn prilingvajn ideojn), kiuj allogas min malfermi la libron.

En la Enkonduko, la aŭtorino skizas la ĉeftemon. Laŭ ŝi, la progreso de socio ŝanĝas la stabilecon de komunika komunumo tempe kaj space. Oni ne plu povas limigi sin al diskuto de la temo nur laŭ tradiciaj metodo kaj vidpunkto: la esploro devas esti multflanka. Pro la evoluado kaj formiĝo de la Eŭropa Unio, oni urĝe bezonas veran komunikan komunumon, kiu povas esti formita nur per komuna lingvo. Ĉu komuna lingvo tiel gravas al Eŭropa Unio? Ĉu

komunika komunumo necesas por unuiĝanta Eŭropo? Kial ni devas starigi novan Eŭropon kun komuna komunikilo, anstataŭ plue sekvi la modelon de la nuna plurlingvismo? La aŭtoro respondas tiujn demandojn historie, socie, ekonomike, politike, kulture. En la fino de tiu ĉi parto, la aŭtorino atentigas, ke kutime la esploristo, kiu diskutas la temon, estas partiana. Sendube, se la temo tuŝas la gepatran lingvon de la esploristo. Laŭ mi, tia partianeco eble iugrade influas la proponojn de lingvistoj pri la problemo de interlingva komunikado.

En la unua ĉapitro, la aŭtorino unue prezentas al ni la malfacilon difini ‘nacion’ kaj ‘naciismon’. Konsiderante la gravecon de la nocioj por sekvaj ĉapitroj, ŝi starigas laboran difinon de la nocioj el politika, ekonomika, morala, kultura kaj lingvistika vidpunktoj. Sekve, estas diskutataj: nacismo kaj lingva naciismo, modernismo, post-modernismo, industriismo kaj demokratio. Laŭ la aŭtorino (p. 14), “a nation should be a community in which all members can communicate with each other, a ‘community of communication’” (Nacio devus esti komunumo kie ĉiuj membroj povu komunikiĝi unu kun alia, ‘komunumo komunika’).

La ĉeftemo de la dua ĉapitro estas la funkcio de lingvo en formiĝo de nacia ŝtato. Fakte, tiu ĉi ankaŭ estas unu el la ĉeftemoj de la libro. Per la formiĝa historio de kelkaj nacioj kaj ŝtatoj en Eŭropo, la aŭtorino enkondukas tri modelojn al la legantoj: asimilado, sango-apartenado kaj fragmentigo. Kiam menciitas la fragmentigo, oni ne malfacile konstatas “... the virtual impossibility of achieving absolute political and cultural congruence in the mosaic of Europe” (la preskaŭan neebilon atingi absolutan politikan kaj kulturan kongruon en la mozaiko eŭropa) (p. 53).

“Language as a key organising principle of nationalism” (La lingvo kiel ŝlosila organiza principo de naciismo) estas la titolo de la tria ĉapitro, kaj en la unua alineo (p. 61) ni legas, “It has become clear that the issue of language has always to be addressed in the context of nation building and that it is more central to the issue than many allow” (Fariĝis klare, ke la lingvan demandon oni devas ĉiam fronti en la kunteksto de nacioformado kaj ke ĝi estas pli centra al tiu temo ol multaj homoj agnoskas). Post prezento de ĉefaj skoloj pri la rolo de lingvo en nacia aŭ grupa formiĝo, ni eĉ relegas la ideon de Stalin, “National community is inconceivable without a common language” (Nacia komuneco estas nekonceptebla sen komuna lingvo) (p.62). La legantoj kredos ke la titolo de ĉi tiu ĉapitro estas ja racia.

Per antaŭaj ĉapitroj ni konas la gravan rolon de lingvo en nacia formiĝo. Tamen, multaj faktoroj evidentigas, ke nia mondo fariĝas unu vilaĝo. La vento de internaciigo blovas al ĉiuj anguloj de la tergloblo. En la kvara ĉapitro, la aŭtorino diskutas la problemon de tutmondiĝo kaj internaciigo el leĝa, politika,

ekonomika kaj kultura vidpunktoj. La angla ludas gravan rolon en la procezo. Iusignife, “globalisation seems to constitute anglicisation” (tutmondiĝo ŝajnas konsistigi angliĝon). Se ni revenas el tutmondo al Eŭropo, ni trovas, ke la franca lingvo de la 18-a jarcento havis lokon similan al tiu de la hodiaŭa angla, almenaŭ se ni analizas la motivojn de la lernantoj de la angla kaj tiama franca.

La aŭtorino revenigas nin al Eŭropo, skize resumante la historion de eŭropa integriĝo kaj enkondukante tri tendencojn aŭ teoriojn de integriĝo. Estas konate, ke la Eŭropa Unio uzis/as plurlingvan politikon. Alidirite, en la nuna ŝtupo, la Eŭropa Unio ankoraŭ insistas pri la politiko de multlingvismo; sed levigas la demandojn “Can the EU make any progress towards becoming a democratic polity without solving its communication problems?” (Ĉu EU kapablas entute progresi al kreiĝo de demokrata polito sen solvi siajn komunikajn problemojn?), “Is it inevitable that there will be profound linguistic consequences if the economic, political, defence, social and legal ties that the European Union has brought about between Member States continue to deepen and strengthen?” (Ĉu neeviteblas, ke sekvos profundaj lingvaj konsekvencoj se la ekonomiaj, politikaj, defendaj, sociaj kaj juraj ligoj, kiujn estigis la Eŭropa Unio inter siaj ŝtatoj-membroj, daŭre profundiĝos kaj plifortiĝos?). Ĉu oni komprenas kiu estas pli grava en komunumo, demokratio aŭ komunikado? Eble ekzistas vera demokratio sen komunikado?

En la unua alineo (p. 126) preskaŭ kristaliĝas la tuta enhavo de la sesa ĉapitro, kiu ekzamenas “the role of the community of communication in a democratic polity” (la rolon de la komunika komunumo en demokratia polito) kaj esploras “how far the plurilingualism of the EU restrains its political actors, bureaucrats and peoples from following the mainstream traditions of European democracy” (kiagrade la plurlingvismo de EU malhelpas ĝiajn politikajn rolantojn, burokratojn kaj popolojn sekvi la ĉefajn tradiciajn fluojn de la eŭropa demokrateco). La aŭtorino kredigas nin, ke “kohera komunumo de komunikado estas necesa por praktiki demokratecon” kaj ni jam scias ke la lingvo estas grava faktoro en formiĝo de komunumo komunikada. Fakte, tie ni renkontas la dilemon, kiun mi multfoje menciis en recenzoj de similtamaj libroj (Liu 1999, 2000): demokratio devas permesi, ke oni libere uzu sian gepatran lingvon, sed la tendenco de tutmondiĝo ne permesas tion. Kiel oni povas aktive partopreni la tutmondiĝon, tamen samtempe ne perdi la lingvan rajton? Ni vidos kiel la aŭtorino solvas la dileman problemon.

En sekvaj tri ĉapitroj, kelkaj lingvaj politikoj kaj nunaj situacioj en specialaj kampoj de nuna Eŭropo estas diskutataj. Ĉiuj montras ke komunika komunumo estas necesa por formi veran komunumon kaj Union.

En la 10a, konkluda ĉapitro, la aŭtorino proponas kelkajn eblajn solvojn: lernadon de fremdlingvoj, *lingua francas* (naturaj interlingvoj), kaj planlingvo. Ni rimarkas ke la aŭtorino subtitolas la diskuton pri planlingvoj, “Other, and less likely, solutions” (Aliaj, kaj malpli verŝajnaj, solvoj). La aŭtorino skribas, ke en ideala mondo iu plene idealista solvo kiel Esperanto eliminus la plejparton de la lingvaj problemoj de la Eŭropa Unio, kaj ne nur en ĝiaj institucioj (“In an ideal world some wholly idealistic solution like Esperanto would solve most of the linguistic problems of the European Union and not only in its institutions” p. 246). Ŝi aldonas, ke “No section of the EU would reject Esperanto in the way that it would reject English” (Neniu sekcio de EU malakceptus Esperanton tiel kiel ĝi malakceptus la anglan). Vere belega panoramo: ĉiuj problemoj pri lingvo estus solvitaj! Tamen, la aŭtorino daŭrigas (p. 247), ke “without massive institutional support and a campaign to win hearts and minds,” (sen enorma institucia subteno kaj kampanjo por gajni la korojn kaj mensojn), Esperanto verŝajne ne disvastiĝos: “It does not have the base from which to grow in an organic way, gathering momentum. This is a circle which it is difficult to break.” (Ĝi ne posedas sufiĉan bazon, el kiu eblus kreski organike, gajnante rapidon. Temas pri cirklo malfacile rompebla). Ĉu la politikistoj neniam atentis la solan taŭgan solvon? Eble nur historio respondas tion. La aŭtorino finas la libron per jenaj vortoj (p. 250): “Language would appear to be a key element in the construction of any Union which processes beyond a free market. Difficulties in communication will restrict integration; ease of communication speeds the process” (Ŝajnas, ke la lingvo estas ŝlosila elemento en konstruo de kiu ajn Unio, kiu procedas preter libera merkato. Komunikaj malfacilaĵoj limigos integriĝon; komunika facileco rapidigas la procedon).

Oni devas agnoski, ke la libro liveras al la legantoj nemalmultajn interesaĵojn pri la lingva rolo en la formiĝo kaj evoluo de nacio kaj super-nacia organizo. La libro estas utila referenco por ĉiuj, kiuj zorgas pri la integriĝo de Eŭropo. Al politikistoj, kiuj faras la lingvan politikon de la Eŭropa Unio, mi forte rekomendas la libron.

Referencoj

- Liu Haitao. 1999. Plurlingvismo: ĉu malbeno aŭ beno? *Esperanto aktuell*. 7: 10–11.
Liu Haitao. 2000. Recenzo de Tove Skutnabb-Kangas, *Linguistic Genocide in Education — or Worldwide Diversity and Human Rights. Informilo por Interlingvistoj*. 4 (35): 2–6.

Adreso de la recenzanto

Applied Linguistics Department,
 School of Presentation Art,
 Beijing Broadcasting Institute,
 No.1 Dingfuzhuang Dongjie,
 Chaoyang District, Beijing, CN-100024
 P.R. Ĉinio
 htliu@bbi.edu.cn.

Pri la recenzanto

LIU Haitao estas profesoro pri komputa kaj aplikata lingvistiko en Beijing Broadcasting Institute. Liaj esploraj interesoj estas komputa lingvistiko, interlingvistiko, lingva planado.



Colin Baker and Nancy H. Hornberger (eds.). *An Introductory Reader to the Writings of Jim Cummins.* Clevedon: Multilingual Matters.
 2001. viii + 360pp.

Reviewed by Timothy Reagan

In the recording industry, it has long been common practice to issue collections and compilations of the work of successful popular artists, often under the title “The Best of . . .” Such compilations are popular with the public, and most of us own a fair number. Then there are published collections of radio commentaries, especially those from National Public Radio, like Bailey White’s *Mama Makes Up Her Mind*¹ and Geoffrey Nunberg’s *The Way We Talk Now*.² Finally, there are collections of previously published commentary from newspapers and magazines, such as the many compilations of Molly Ivins’ columns.³

Fortunately, this trend has generally stopped short of collections of academic articles. I say “fortunately” because most of us really don’t have a sufficient number of high quality, timely and significant works to be included in a meaningful compilation, and, in any event, the market for such collections would be embarrassingly small. If any readers were waiting expectantly for *The Best Scholarship of Timothy Reagan*, in short, they will have a long wait indeed. There are, though, a very few individuals in academe for whom this is not the case — individuals whose work has been not only important, but pivotal in their own and other fields of study. Jim Cummins is such an individual, and